

& Pli rev' ol vero!:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio de Roncevala batalo kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (#Runtsivalsstrîdið:

/mi fami mire dooLaLa dore mimi mi; mildo dore redo dooLaLa dore mimi mi;

(#Rekantaĵe: mimore doTi LaSo La;La dore mimi mi; mido dore redo doLa do Ti La lmi)

)×20)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Sensperta nur junulo kaj preskaŭ nur infan', ;
De2 l' sorto frufrapita naiva homaran'

(×: **Rajdas ili el Franca land' ; kun kara pred' en sel' ; blovu kornon Olivant' en Ronceva2l'.**)

'2 Revadis pri feliĉo, pri amo reciproka ; Dum sangis lia koro en urbo Bjalistoka. –

'3 Sufera atestanto tro frue de pogrom', ; Vekiĝis en infano jam voloforta hom',

'4 Kaj li ofere forĝis la ilon de l' kompreno ; El sia propra koro, el amo kaj ĉagreno;

'5 Kaj multvalora kerno sin kaŝis sub la ŝelo: ;
"Interna la Ideo" – jen estis la juvelo!

'6 Magie ĝi ekbrilis, kun forto de mister' ;
Komencis la miraklon de Paco sur la Ter'.

,& Dua:

'7 Sed ve! – forpasis jaroj... arĝenta jubileo... ;
Plenvive pulsas Lingvo, sed velkas jam l' Ideo!
.....

'8 Kaj vane fuŝpoetoj pri ĝi banale rimas, ; Per vortoj ĝi ne vivos, – almenaŭ mi ĝin timas –

'9 Kaj ruzaj praktikuloj ne plu bezonas ĝin, ; Do mortu la Ideo laŭ plaĉo de l' destin'!

'10 Ĝi estis utopio, infana nur afero, ; Kaj pli agrable tintas la sono de monero.

'11 Jes, prave, ho filistro, vi turnu tiun paĝon ; Kaj plue kun profito disvendu do fromaĝon!

'12 En arta skatoleto, kun Esperanta moto, ; Ĝi tra la mondo iros ĝis ĉe la Hotentoto. –

,& Tria:

'13 Ĉu ne, samideano, mi ŝparu la rimarkojn, ; Vi tamen nur bildflanke kolektos poŝtajn markojn,
.....

'14 Vi tamen amindumos, sen risko, sendanĝere, ;
Kun ĉarma fremdanino poŝtkarte aŭ letere,

'15 Vi tamen reveturos al kiu ajn kongres' ; Kaj ĝojos... se la balo finiĝas kun sukces'!

'16 Vi kantos emocie kun plore pia sento ; La himnon de l' espero kaj de l' facila vento;

'17 Konfuzo vi remiksos la Homan Familion ; Kaj pli profitan ismon kaj eĉ Filatelion,

'18 Kaj dum vi fanfaronos pri daŭra Pac-spirito ;
Per osta pugno frapos rikane vin Milito...

,& Kvara:

'19 Ĉar, ke l' esperantistoj por paca la batal' ;
Kunvenas sub la ŝildo de Majstro-ideal',

'20 Ke nun ankoraŭ kreskas rapide la afero, ; Jam estas, bedaŭrinde kaj ve! – pli Rev' ol Vero.)